

malneta traduko

A/RES/73/338

Rezolucio akceptita de la Ĝenerala Asembleo la 12-an de septembro 2019

Internacia Jaro de Paco kaj Konfido

La Ĝenerala Asembleo,

Rekonfirmante la Ĉarton de Unuiĝintaj Nacioj kaj ties celojn kaj principojn, kaj precipe la sindevigon solvi disputojn per pacaj vojoj kaj la insiston savi estontajn generaciojn de la plago de milito,

Rekonante la gravan rolon de Unuiĝintaj Nacioj en evoluigado de amikaj rilatoj inter nacioj,

Konsentante, ke aliro per multflankismo kaj diplomatio povus refortigi la antaŭenigon de la tri kolonoj de Unuiĝintaj Nacioj, nome, daŭripova evoluigo, paco kaj sekureco, kaj homaj rajtoj, kiuj estas interligitaj kaj reciproke refortigaj, dume sekvante respektivajn mandatojn kaj la Ĉarton,

Rekonante la gravecon de la Deklaro kaj Agadprogramo de la Kulturo de Paco, kiuj rolas kiel la universala mandato por la internacia komunumo, precipe la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj, por la antaŭenigo de kulturo de paco kaj neperforto kiu avantaĝu la homaron, precipe estontajn generaciojn,

Rekonante ankaŭ la urĝan bezonon antaŭenigi kaj plifortigi preventan diplomation, interalie per multflankismo kaj politika dialogo, kaj la gravan tiurilatan rolon de Unuiĝintaj Nacioj,

Agnoskante, ke paco kaj konfido necesigas akcepti malkonsentojn kaj kapabli aŭskulti, rekoni, respekti kaj estimi aliajn, kaj ankaŭ vivi pace kaj unuigite,

Rekonante la rolon de internaciaj, regionaj kaj subregionaj organizoj, laŭ ties mandatoj, en antaŭenigo kaj konservado de paco,

Rekonante ankaŭ, ke paco ne nur estas la neĉeesto de konflikto, sed ankaŭ postulas pozitivan, dinamikan partoprenan procedon kie oni instigas dialogon kaj konfliktoj estas solvataj en spirito de reciprokaj interkompreniĝo kaj kunlaboro,

Substrekante la gravecon de preventa diplomatio subtene al la klopodoj de Unuiĝintaj Nacioj por antaŭenigi la pacan solvado de konfliktoj, cele al konservode paco,

Rekonfirmante siajn rezoluciojn 53/199 de 15-a decembro 1998 kaj 61/185 de 20 decembro 2006 pri la proklamado de internaciaj jaroj, kaj la rezolucion 1980/67 de la Ekonomia kaj Social Konsilio de 25 julio 1980 pri internaciaj jaroj kaj datrevenoj, precipe paragrafojn 1 ĝis 10 de la tiurilata anekso pri la interkonsentitaj kriterioj por proklamado de internaciaj jaroj, kaj same paragrafojn 13 kaj 14, kie estas

postulate ke internacia tago aŭ jaro ne estu proklamita ĝis oni jam faris la bazajn aranĝojn por ties organizado kaj financado,

rekonfirmante ankaŭ la Jarmilan Deklaron de Unuiĝintaj Nacioj kaj ties rezolucion 70/1 de la 25-a de septembro titolitan "Transformi nian mondon: la Programo 2030 por Daŭripova Evoluigo",

Kuraĝigante la daŭrajn kaj kreskantajn klopodojn kaj agadojn fare de civilsociaj organizoj tra la mondo por antaŭenigi kulturon de paco, kiel antaŭvidite en la Deklaro kaj Agadprogramo pri Kulturo de Paco,

1. *Deklaras la jaron 2021* la Internacia Jaro de Paco kaj Konfido;
2. *Substrekas*, ke la Internacia Jaro de Paco kaj Konfido konsistigas manieron mobilizi la klopodojn de la internacia komunumo por antaŭenigi pacon kaj konfidon inter nacioj surbaze de, interalie, politika dialogo, reciproka kompreniĝo, kaj kunlaboro, por konstrui daŭripovan pacon, solidaron kaj harmonion;
3. *Alvokas al* la internacia komunumo, ke ĝi daŭrigu antaŭenigon de paco kaj konfido inter nacioj kiel valoron kiu antaŭenigas daŭripovan evoluigon, pacon kaj sekurecon, kaj homajn rajtojn;
4. *Invitas* ĉiujn Membrojn Ŝtatojn, organizojn ene de la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj, aliajn koncernajn internaciajn kaj regionajn organizojn kaj civilan socion inkluzive de neregistaraj organizoj, individuojn kaj aliajn koncernajn interesatojn, ke ili faciligu observadon de la Internacia Jaro de Paco kaj Konfido, laŭ taŭga maniero, kaj dissemu la avantaĝojn de paco kaj konfido, inkluzive pere de edukado kaj de agado kiu levu la konscion de la publiko;
5. *Petas* la Ĝeneralan Sekretarion atentigi pri la nuna rezolucio ĉiujn Membrojn Ŝtatojn, organizojn de la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj kaj aliajn internaciajn kaj regionajn organizojn, kaj ankaŭ la civilan socion, inkluzive de neregistaraj organizoj kaj individuoj;
6. *Emfazas*, ke la kostoj de ĉiuj aktivecoj kiuj eventuale ekestas el la realigo de la nuna rezolucio estu kovrataj el nedevigaj kontribuajtoj.

12 septembro 2019